

6-a Kultura Semajnfino en Renens

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 555, 1974.05.29 & 06.01

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

En printempo kaj en aŭtuno Kultura Centro Esperantista okazigas en Renens apud Lausanne semajnfinojn, kies karakterizaĵo estas la samtempa disvolviĝo de kvar paralelaj programoj. Laŭ sia aĝo kaj lingvo-kapablo la ĉeestantoj dividiĝas jene : La esperantistoj ŝatantaj aŭdi interesajn prelegojn formas la grupon A ; la esperanto-gelemlernantoj formas la grupon B ; en la grupo C oni povas malkovri, kio fakte estas esperanto ; la infanoj kaj geknaboj formas la grupon D.

A.- Sesa tia Kultura Semajnfino arigis en Renens la 11-an kaj 12-an de majo pli ol 80 personojn venintajn el ĉiuj lingvaj regionoj de Svislando kaj el Francio. La sekretario de la Akademio de Esperanto, sinjoro Roger Bernard, estis ĉifoje la ĉefprelegisto. Li parolis **pri la tradukarto**. Li faris **historion de la esperantaj kabaretoj** kaj prezentis **la personecon kaj vivon de sia amiko Raymond Schwartz**.

Cl.- Roger Bernard famiĝis pro siaj esperantigoj de franclingvaj modernaj beletraj ĉefverkoj. Kiel frukto de lia traduklaboro ni menciuj la sekvajn eldonitaĵojn : *La P... respektima*, *Sen Eliro* kaj *La Naŭzo* de Jean-Paul Sartre, *Topaze* de Marcel Pagnol, *La Ŝipego Tenacity* de Charles Vildrac. Baldaŭ aperos *La Granda Meaulnes* de Alain Fournier.

A.- Sub la titolo *Apenaŭ bukedo* estas aĉeteblaj la poemoj, kiujn Roger Bernard tradukis el la franca literaturo.

Cl.- Koncerne la tradukarton Roger Bernard havas la rajton paroli. Li unue listigis la problemojn, kiujn beletra tradukisto devas alfronti kaj provi solvi. Ĉiuj fine resumiĝas en la respekto de la stilo kaj lingvo de la aŭtoro kaj en la fideleco al la signifo de la teksto. Roger Bernard opinias, ke pro siaj fraz-flekseblo kaj vortkonstru-kapablo Esperanto estas mirinda traduk-instrumento. Tamen nur personoj, kiuj vere ellernis la internacian lingvon, kapablas regi tiun instrumenton. La komencantoj, kiuj sin ĵetas en la traduk-laboron, ofte ne konscias pri la danĝero de la falsaj amikoj, tiuj samformaj vortoj, kiuj ne havas saman signifon en la du labor-lingvoj. La vortludoj estas ofte netradukeblaj. Tradukado de poemo estas vera veto, kiun povas gajni nur tradukisto, kiu mem estas poeto. Al la jam menciitaj malfacilaĵoj aldoniĝas la devo respekti la ritmon kaj la rimojn de la originalaĵo.

A.- Roger Bernard, en sia historio de la esperantaj kabaretoj, prezentis retrospektaklon. Per tiu mokŝercema kaj ne ĉiam ton-ĝusta voĉo, kiu karakterizas la parizajn kanzonistojn, li recitis kaj kantis verkojn, kiuj famigis en tutan Esperantion la Montmartrajn kabaretojn **La Verda Kato** inter 1920 kaj 1930 kaj **La Tri Koboldoj** post la dua mondmilito. Ambaŭ respegulis la talenton de la humoristo Raymond Schwartz, kies repertuaro estas tipe tiu de la parizaj kanzonistoj. Ĝi rilatas al aktualaĵoj kaj ŝatas flirtemon kaj trivialan malprudon. Ĝi ne timas la improvizacion ekde amuza elekto de rimoj absolute arbitraj. En Renens la publiko vigle aplaŭdis Roger Bernard, kiu fakte estis unu el la aktoroj de **La Tri Koboldoj**.

Cl.- Prelego pri la vivo kaj verkaro de Raymond Schwartz estis taŭga sekvo al la du unuaj paroladoj. Roger Bernard memorigis, ke Raymond Schwartz estis perfekta dulingvano. La francan li parolis hejme, dum la germanan li praktikis en la lernejo. Jen karakteriza trajto de la vivo en Loreno antaŭ 1918. Kun sama talento kaj sukceso Raymond Schwartz verkis en

Esperanto por tri ĝenroj : kanzona poezio, novel- kaj roman-arto. Liaj satiraĵoj aperintaj en pluraj revuoj, interalie en *La Pirato*, kiun li mem fondis kaj vivtenis, kontribuis al la fortikiĝo de la esperanto-socio. La genio de Raymond Schwartz riveligis antaŭ ĉio en la romano *Kiel akvo de l' rivero*, kiun nur verkisto konanta plej intime la francan kaj germanan spirito-statojn povis naski. Roger Bernard citis fragmentojn el tiu ĝis nun plej longa originala romano en Esperanto, malkovrigante, kiu fakte estis Raymond Schwartz : viro gaja sed indulga, malamiko de ĉia snobismo kaj elturniĝo, hom-observanto realisma. Roger Bernard konkludis menciante la profundan kredon de Raymond Schwartz : « *Mi firme kredas, ke la homaro estas granda familio, sed kia familio, mia Dio ! kia familio !* »

A.- Oni povas ankoraŭ multon diri pri tiu riĉa sesa Kultura Semajnfino Esperantista okazinta en Renens apud Lausanne. Alia tradukisto, Claude Piron, konkludis debaton pri la nunaj praktikaj problemoj ligitaj al la oficialigo de Esperanto. Montriĝis, ke tiuj problemoj antaŭ ĉio dependas de la manko de interpretistoj, tradukistoj, protokolistoj kaj stenotajpisto Esperantistaj kaj de la manko de bonaj vortaroj kaj terminologiaj bultenoj. La esperanto-publiko ofte ne konscias pri tiuj mankoj. Kultura Centro Esperantista intencas organizi feriajn kursojn por helpi al la formado de esperantistoj kapablaj labori en tiuj fakoj. Pri tio ni raportos en venonta elsendo.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!